Ni ne preterlasu aparte danki s-inon *I. Bednarz* pro ŝia utilega SR-bibliografio, koncernanta la jarojn 1949-1982 kaj aperinta ĉe Pola Esperanto-Asocio (1984).

Okaze de la jubilea rememorado ni devas pensi ankaŭ pri la fidelaj abonantoj-legantoj, kiuj certe ne ĉesos daŭrigi la malfacilan vivtenadon de nia revuo, kies longa historio ĝis hodiaŭ pruvis taŭgecon de Esperanto sur plej diversaj scienc-kampoj. Ne povas esti dubo, ke SR efike helpis al stabiligado de koncernaj faklingvoj.

Ankaŭ future, ni devus konscience prezentadi en nia revuo, komune kun la plej supera lingva instanco, Akademio de Esperanto, altnivelan terminologion, sur kiu povus sin apogi ĉiu serioza specialisto.

*J. Kavka*

SCIENCA REVUO, vol. 38 (1987), n-ro 2 (154)

# Ekslibrisoj

*Kazimierz Szczurek* (Pollando)*

## 1. Historia skizo

Mil kvarcent jarojn antaŭ Kristo, la egipta faraono Amenotepo la 3-a, laŭ aserto de historiistoj, posedis libraron konsistantan el rulaĵoj. Al ili oni ligis etajn tabulojn fajencajn kun surskribo montranta la posedanton. Unu tian tabuleton, helbluan kun malhele blua surskribo, posedas Brita Muzeo en Londono.

Tiujn tabuletojn oni nun opinias prototipoj de la pli poste populariĝinta signo lokata en la libron kaj indikanta ties posedanton.

Longan tempon tiu kutimo restadis morta, sed fine de la mezepoko, ankoraŭ en la periodo, kiam librojn oni skribadis mane, oni ree lokadis en ili specialan signon atestantan pri la proprieto. Tiun signon ni nomas ekslibriso. La termino devenas el la latina lingvo kaj signifas "el la libroj". Skribita en la libro, kune kun antaŭ- kaj famili-nomo, ekz.:

*Ex libris Josephi Montani*

klare montras, al kiu la libro apartenas.

La plej malnovajn mezepokajn signojn oni pentris kutime sur la suba marĝeno de la unua paĝo. Tre oftis blazonoj, sed multaj estis ankaŭ portretoj, alegoriaj pentraĵoj k.s. La mane skribita libra signo vivis ĉirkaŭ du jarcentojn; la lastajn ekzemplerojn ni renkontas en deksesajarcentaj libroj, poste oni ne plu aplikis ilin. Sed ne malaperis la ekslibriso mem. La rolon de la pentrita signo transprenis la supralibroso (signifanta "sur la libroj"). Ĝi estis libra signo sur la unua flanko de la bindaĵo. La bindaĵisto faris stampileskan matricon, kutime metalan, kaj varmigitan premis ĝin forte al humidigita surfaco

**Przepilińskiego 28, 43-400 CIESZYN*

de la bindaĵo. Per tia gofro aperis daŭra signo atestanta pri la proprieto, sed ankaŭ estanta grava ornamo de la bindaĵo. La gofritaj signoj povas esti aŭ "blindaj", t.e. senkoloraj, aŭ koloraj. La lastaj postulas, antaŭ ol premi al la bindaĵo, kolorigon de la matrico aŭ "alprenon" de oro per premo al delikata, tre maldika orfolio.

La supralibrosoj prezentis kutime blazonojn solajn aŭ kun nomoj, kun diversaj devizoj, monogramojn, simbolojn k.t.p.

Sed tiuj signoj estis multekostaj kaj ili aspektis bele sur bindaĵo leda; tolo kaj kartono ne tre "emis" ekcepti ilin. Eble pro tio ili plej oftis sur libroj de reĝoj, ministroj, episkopoj kaj diversaj riĉuloj. Naskiĝintaj en la 15-a jc., vereble en Francio, ili disvastiĝis al aliaj landoj eŭropaj, en la 16-a travivis kulminon de sia populareco, estis aplikataj ankoraŭ en la 17-a kaj 18-a, kvankam ne tiel ofte kiel antaŭe kaj poste preskaŭ malaperis, cetere simile kiel la leda bindaĵo.

Sed fine de la 15-a jarcento apud ili aperis la ekslibriso en formo ĝis nun aplikata: signo sur eta paperfolio algluebla al libro, kutime al la dua paĝo de la bindaĵo. Pri tia signo mi volas nun paroli.

La plej fruaj tiuspecaj en Eŭropo estis verŝajne tiuj de la bavaria ekleziulo *Hans Igler*, el 1470. Tridek jarojn pli poste aperis ekslibriso de la bazela episkopo *Telamonius Limberger*, en 1498. En 1511 devenas ekslibriso de *V. Pirckheimer*. Baldaŭ la ekslibriso plioftiĝis: la unua pola devenas el 1516, la franca el ĉirkaŭ 1529, la bohemia el 1536, la itala el la mezo de la 16-a jc.

En Ruslando aperis ekslibriso nur dum la regado de Petro la Granda. Unua florperiodo de la ekslibriso estis la renesanco. Tiutempa plaĉo je formoj klaraj kaj puraj, parenca al tiu de l' antikvaj grekoj kaj romanoj, kreis ekslibrison kun klara bildo. En sia strebo al nobla simpleco, renesancaj artistoj evitadis ĉion ne nepre bezonan, ĉion abundan, komplikan kaj troan. Ili plej ofte esprimis sin per lignogravuraĵo.

Post kiam la baroko detruis la plaĉon de la antaŭa epoko, la ekslibriso konformiĝis al la nova tempo: klara simpleco cedis al riĉa abundo, modesteco al ornamemo, kaj la ĉefa eco de la nova ekslibriso fariĝis la tendenco. La posedanto de la libro volis, ke artistoj prezentu lian splendoron, famon de liaj domo kaj familio. La splendoro imponas kaj impresas; ĝi plaĉas en la vivo, do ĝi estu ankaŭ en la libroj. Nu, ni iome simpligis la problemon. La diferencon inter la baroka kaj la renesanca ekslibrisoj ne eblas esprimi per



kelkaj frazoj, sed la principa evolu-tendenco estis tia.

Cetere, la baroko estis por la okcidenteŭropa ekslibriso tempo de regreso, la klopodoj plenplenigi tiun signon per ornamaj elementoj malaltigis ĝian artan nivelon. Tie-ie aperis, fakte, ekzempleroj elstaraj, eĉ majstraj, sed abundis meznivelaj aŭ entute senvaloraj.

Nur la 18-a jc. alportis novan ekfloron. Pri la ekslibriso ekokupiĝis multaj eminentaj artistoj, krom la jam konataj motivoj aperis alegorioj, fragmentoj de antikvaj ruinoj, internoj de bibliotekoj, pejzaĝoj, terglobo, fermitaj aŭ malfermitaj libroj k.s. La revenanta modo je antikvaj klasikaĵoj influis ankaŭ la ekslibrison.

Sed tiu florado ricevis fortan baton en la jaro 1789. En Francio la postrevolucia ĥaoso preskaŭ mortigis la interesiĝon pri ekslibriso, kaj tio, laŭvice, influis ankaŭ aliajn landojn de Eŭropo. Rapide degeladis la bezonantaro, al artistoj mankis ne nur mendoj, sed ankaŭ instigo por kreado. Multajn jardekojn daŭris la stagnado; novan ekfloron alportis ja nur la fino de la 19-a jc. Tiu nova prospera ondo, denove venanta el Francio, ĉirkaŭ 1870 rapide ekfluis al ceteraj landoj kaj baldaŭ komencis novan, longan flortempon. La interesiĝo pri la ekslibriso nun manifestis sin pli diversforme: plu riĉiĝis la motivaro, oni ekkolektis ekslibrisojn, fondiĝis societoj de kolektantoj, ekaperadis specialaj revuoj, la ekslibriso fariĝis temo por sciencaj esploroj kaj disertaĵoj.

Blazonoj, emblemoj, atributoj de aŭtoritato nun devis cedi al signoj, kies ĉefa tasko estis reprezenti ne nur posedanton, sed ankaŭ liajn interesiĝojn. Ekz. verkistoj gravurigis librojn, ŝrankojn kun libroj, bibliotekojn, strigojn; muzikistoj — muziknotojn aŭ muzikilojn; pentristoj — paletrojn, penikojn, stablojn. Homoj interesataj de malnova armilaro kutime prezentigis kirasojn kaj glavojn; kuracistoj — kuracistajn akcesoraĵojn; oftis konstruaĵoj aŭ fragmentoj de rubo, kiujn la posedanto de la ekslibriso pro iu kaŭzo speciale ŝatis, aŭ kiuj distingiĝis per siaj belo kaj valoro.

Ofte oni klopodis esprimi iun devizon per alegorio. Kiel ekzemplo de tia ekslibriso povas servi la signo de *Gabriela Krasnopolska* en Prago. Ĝi prezentas aperian libron, super kiu staras homa figuro; ambaŭon ĉirkaŭas stiligitaj branĉoj kun folioj kaj fruktoj; supre sur zono troviĝas latina teksto: *Inter folia fructus* ("inter la folioj troviĝas la fruktoj").

Tiu florado kulminis en la dua jardeko de la 20-a jc. Hastante al novaj

atingoj, multaj artistoj forlasis la novajn, laŭmodajn metodojn, kiuj ne trovis esperitan aprecon, kaj returnis sin al metodoj jam elprovitaj, ligitaj kun la — ĝis tiam — grandaj sukcesoj en la ekslibrisa arto, nome al ksilografio, kuprografio kaj akvaforto, kiuj, cetere, estis ankaŭ travivantaj periodon de rea populareco.

Sed kun la supre menciita tempo ŝanĝiĝis la rilato al la ekslibriso. Ĝi estis pli kaj pli perdanta la signifon kiel enlibra signo montranta apartenon de la libro, fariĝante sendependa speco de artaĵo. Ĉuste la flanko arta, ne la biblioteka, ekdominis, ĉefe en la rondoj de novaj kolektantoj, la ekslibrison oni kolektis precipe kiel artan grafikaĵon.

Tiun belan prosperon abrupte interrompis la mondmilito. Movado internacia tute ne eblis, okazadis nek kunvenoj, nek kongresoj, nek ekspozicioj de ekslibrisoj, ne eblis interŝanĝi, la artistoj laboris malmulte, plejparte por stoko uzebla en estonteco. Kiel kutime — la muzoj silentis dum la batalado.

Sed sole dum la batalado. Ĉar, post kiam la milito finiĝis, tuj montris sin simptomoj de renaskiĝo. Denove kontaktiĝis kolektantoj, diversflanken migris ekslibrisoj interŝanĝe, reviviĝis societoj en la senjugigitaj landoj, ekokazadis internaciaj renkontiĝoj de ekslibriskolektantoj. Hodiaŭ ni povas diri ke — kvankam la ekslibrismovado ne reakiris tiun impetan evolun de la jaroj 1920-30 — ĝi viglas, prosperas kaj povas fieri pro atingoj, koncerne la ekslibrison mem kiel artaĵon, ekstreme valoraj.

* * *

Indas aldoni, ke la surskribo *ex libris*, kvankam sendube plej ofta, ne estis unusola. Oftis ankaŭ aliaj, ekz. *ex bibliotheca*; ĉe muzikistoj renkonteblas *ex muzicis, ex libris et muzicis*, kio pli ekzakte redonas la ĥarakteron de la kolekto, memkompreneble se ĝi konsistas el muziknotoj kaj libroj koncernantaj muzikon. Ankaŭ la esprimon *ex libris* oni klopodis precizigi, kaj tiel naskiĝis surskriboj pli longaj sed ankaŭ pli multe dirantaj, ekz. *ex libris gnomonicis, ex libris eroticis.*

Pli nova tempo (dum kiu magriĝis la kono de la latina lingvo) ofte trakukis la esprimon. La lokon de *ex libris* okupis nacilingvaj "el la libroj de...", "el la biblioteko de...", "el la kolekto de...", "libro de..." kaj simile, ekz.: *De la Collection de Musique de Madame Marie Szymanowska, Iz Sobranja Moskovskogo Puŝkinskogo Muzeja, Księgozbiór Joanny i Stefana Vrtel-Wierczyńskich,* Libro de *Edward Keabl, Iz knig doktora Zinovja Korna.*



Sed tiu ĉi kutimo ne venkis ĝenerale; en la regno de l' ekslibriso la nacilingvaj signoj ĝis nun restas minoritato.

## 2. Specoj

Ni menciis jam ekslibrison pentritan, supralibroson, kaj ekslibrison en formo de paperfolieto. La lasta evoluis je kelkaj specoj.

Baldaŭ oni elpensis la tiel nomatan **donacan** ekslibrison; ĝi estis destinita por libroj donacotaj, do indikis ne la posedanton sed la donacinton. Kutime mendis tian signon magnatoj kaj diversaj riĉuloj volantaj tiamaniere famigi sian nomon.

Alispecaĵo estis ekslibriso **blinda**, iame populara precipe en Germanio. Ĝi havas ĉiujn trajtojn de ordinara ekslibriso, krom la nomo. Anstataŭe troviĝas malplena loko, por ke la aĉetonto enskribu tien siajn personaĵojn.

En la 19-a jc. populariĝis ekslibriso **preseja** (tipografiita), sur kiu la presitan surskribon ĉirkaŭas simpla aŭ ornama akcidenca kadro. Ĝi estis produktita tute en presejo, per presistaj iloj — tipoj, kadroj, vinjetoj diversformaj k.s., kutime sen kontribuo de artisto-grafikisto.

Alte aprecata estas ekslibriso **portreta** — rara signo, sur kiu la kutiman bildon anstataŭas portreto de la posedanto.

Fojfoje eldonejoj aŭ librovendejoj eldonis ekslibrison pro iu speciala okazo. Tion faris, ekz., la pola librovendeja entrepreno "Domo de la libro" (*Dom Książki*) okaze de Internacia Foiro en *Poznań*, kaj la eldonejo "Leganto" (*Czytelnik*) je malfermo de sia nova vendejo en *Rzeszów*.

## 3. Poligrafiaj teĥnikoj

En produktado de ekslibrisoj oni aplikadis la samajn metodojn kiel por ornamaĵoj kaj ilustraĵoj. La plej fruaj ekslibrisoj — kiel jam menciite — estis pentritaj; en la 15-a jc. sekvis ksilografiitaj, ne tre pli poste populariĝis kuprogravuraĵo travivonta en la 17-a jc. sian flortempon.

Okaze de **ksilografia** metodo, la artisto glatigas etan lignan (pirarban, pomarban, fagan, juglandan) brikon, ŝmiras ĝin per speciala blanka aŭ nigra farbo, per plumo aŭ grafito skizas la deziratan bildon, per tranĉilo tranĉas la randojn de la skizitaj linioj kaj poste forigas la lignon lasante nur la bildon. Tiel preparita lignopeco, ŝmirita per presfarbo kaj premita al papero, postlasas la ĝustan bildon. Ksilografio spartenas al la t.n. konveksa preso.

Alie estas okaze de **kuprografio**, apartenanta al la konkava preso.

En kuproplato, oni gravuras bildon, ŝmiras ĝin per farbo, forviŝas, la farbo malaperas de sur la platsurfaco sed ne el la kaneloj de la gravuraĵo. Se nun al la plato oni forte premas paperon, la kaneleta farbo postlasas spurojn — la deziratan bildon.

Identa estas la **ŝtalografio**, ĉe kiu la kupran platon anstataŭas plato ŝtala, malpli facile prilaborebla sed tre rezista kontraŭ forfroton kaj tial kapablas liveri pli multe da represaĵoj. La metodo estas relative nova, oni ekaplikis ĝin fine de la 18-a jc.

Al la konkava preso apartenas ankaŭ la tiel nomataj **akvaforto** kaj **akvatinto**. Ĉe akvaforto oni zinkan aŭ kupran platon kovras per verniso, skrapas en ĝi per akrapinta skrapilo la bildon kaj poste trempas en acido. La acido korodas la platon en la lokoj, kie mankas la verniso, sekve de kio aperas kaneletoj. Poste oni forlavas ĉion, ŝmiras la surfacon per pres-tinkturo, forviŝas kaj premas al papero. La metodo similas al kuprografio, diference nur ke la laboron de gravuristo anstataŭas koroda efiko de acido.

**Akvatinto** estas simila metodo, sed dum en akvaforto estas korodataj strekoj, en akvatinto — surfacoj, antaŭe priŝutitaj per kolofonpulvoro. Se oni volas atingi surfacojn diverse nigrajn, oni unujn kovras per verniso, la ceterajn korodas plu. Tiamaniere en akvatinto eblas akiri diversajn nuancojn de nigro.

Okaze de **litografio**, inventita en 1796 de *A. Senefelder*, oni sur speciala, polurita ŝtono pentras bildon per krajono, kolora krajono, tuĉo, akvarelfarboj k.s., surŝprucigas ĉion per febla solvaĵo de salacido aŭ nitrogenacido, poste surmetas presfarbon. La farbo aliĝas al la pentrita bildo, sed ne al la ceteraj lokoj, ĉar ili ĥemie ne akceptas ĝin. Sur la papero, alpremita al la ŝtono, represiĝas la bildo, la ceteraj lokoj ne akceptintaj farbon restas blankaj.

La metodon eblas apliki ankaŭ por zinka aŭ aluminia plato. Nuntempe oni faras tion ofte, ankaŭ por produktado de ekslibrisoj.

Unu el la plej novaj metodoj estas **linoleumgrafio**, apartenanta al la konveksa preso, tre similanta ksilografion. Lignon anstataŭas linoleumo. En ĝi la pentristo per akra tranĉilo gravuras bildon (la ceteran surfacon forigas), ŝmiras per farbo kaj premas al papero. Linoleumo donas represaĵojn kun akre kontrastaj blankoj kaj nigroj.

Jen estas la ĉefaj metodoj aplikataj en produktado de ekslibrisoj. Ni priparolis ilin koncize, sen detaloj, nur por ke ekslibriskolektantoj povu pli bone kompreni kaj pritaksi siajn signojn. Kiel menciite, kelkaj el tiuj metodoj ĝuis apartan preferon. Ni konscie diris "preferon", por akcenti, ke temas pri subjektiva rilato, ne pri objektiva pritakso. Envere, la valoro de ekslibriso, kiel de artaĵo ĝenerale, dependas ne de la metodo, laŭ kiu oni ĝin kreis, sed de l' arta nivelo. Kaj tiu arta nivelo estas problemo nek de materialo, nek de produkta metodo.



## 4. Artistoj

Al la ekslibriso dediĉis en la paseo kaj ankaŭ plu dediĉas sian talenton multaj grandaj artistoj. Ili faris tiun objekton memstara ĝenro de la grafika arto, kaj ĝi — liberiĝinte de la nure enlibra ekzisto — komencis vivi propran vivon ne dependan de siaj origino kaj praktika funkcio.

Kiu eminentis en la kreado de ekslibrisoj? Jen tuj necesas klarigi, ke preskaŭ ne ekzistis artistoj okupiĝantaj esklude pri kreado de la libraj signoj. Tiuj signoj estas nur unu el la artospecoj kaj kreadis ilin artistoj aktivaj ankaŭ en aliaj branĉoj de l' arto. Tamen post kiam montriĝis, ke ekslibriso povas esti vera artaĵo, kapabla esprimi riĉajn pensojn kaj kontentigi altajn kreaspirojn, ekokupiĝis pri ĝi multaj artistoj, fojfoje de plej alta rango.

Jam unu el la plej fruaj ekslibrisoj — ksilografiaĵo devenanta el 1511 kaj apartenınta al *V. Pirckheimer* — estas opiniata verko de *Albrecht Dürer*, eminenta germana artisto, fama ne nur pro siaj pentraĵoj, sed ankaŭ pro ksilo- kaj kupro-grafiitaj libroilustraĵoj. Ekslibrisojn kreis ankaŭ liaj famaj disĉiploj *Hans Baldung Grien, Lucas Cranach, Virgil Solis, Hans Burgner, Hans Holbein*. Inter la barokaj aŭtoroj de ekslibrisoj elstaris *Ägidius Sadeler, Jan Ziarnko, Sebastian Leclerq*. En la 18-a jc. la ekslibriso kiel artaĵo ankaŭ altiris plej renomajn artistojn, kion atestas ekz. la nomoj de *William Hogarth, François Boucher, Charles Cochin, Daniel Chodowiecki, Francesco Bartolozzi, Marten Benigerot*. La deknaŭajarcenta historio de l' ekslibriso registris novajn nomojn. Kreskis la nombro de la signoj, kvankam ilia arta nivelo tre diversis. Super la mezan nivelon elstaris atingaĵoj de *Kajetan Kielisiński, Severin Oleszczyński, Jozef Mehofer*.

La lastaj jardekoj de la 19-a kaj precipe la komenco de la 20-a jc. alportis renaskiĝon de l' ekslibriso. Revenis prefero je ksilografiaĵo, kuprografiaĵo kaj litografiaĵo, rimarkinde kreskis arta nivelo de la signoj, por kio multe

kontribuis kaj la kolektantoj, kaj la kreantoj. Inter tiuj lastaj ofte troveblas artistoj ĝuantaj internacian renomon, ekz. *V. Favorskij, A. Kravĉenko, M. Matorin, W. Skoczylas, A. Połtawski, S. Ostoja-Ĉhrostowski.*

La nivelo de l' ekslibriso stabilas ankaŭ nun - en la dua duono de la 20-a jc. La plej eminentaj kreantoj de ekslibrisoj estas opiniataj *Tranquillo Marangoni, Peteris Upitis, Evgenij Goljaĥovskij, Adam Młodzianowski, Konstanty Sopoćko, Wim Zwiers, Julio Fernandez Saez, Mitko Bakalov, Jaroslav Lukavsky, Gerard Gauden, Aleksi Jupatov. Jupatov* dum sia 40-jara artista agado kreis ĉirkaŭ sescent ekslibrisojn. *A. Kaleŝnikov* nur en 1968 akiris du unuajn premiojn en internaciaj kongresoj: en Barcelono por ekslibriso al Mara Muzeo, kaj en Komo por ekslibriso al Eŭgeno Rosasko.

Memkompreneble, la citita nomaro estas nekompleta. Registri je skalo internacia ĉiujn artistojn okupiĝantajn pri l' ekslibriso, ordigi ilin laŭ artista rango, decidi, kiun noti kaj kiun preterlasi, estus laboro enorma, aŭdaca kaj riska. Do la nomoj supre menciitaj ludu rolon de vojmontriloj en la lando de la ekslibriso, per kiuj sciavida leganto trovu aliajn nomojn, aliajn sciaĵojn kaj propedeŭtikan orientiĝon en la problemo.

## 5. Ekslibris-movado

La fino de la deknaŭa jarcento estis naskiĝtempo de l' ekslibris-movado — baldaŭ populariĝinta, kulminanta en la dua-tria jardekoj de la 20-a jc. kaj viva ĝis hodiaŭ. Pli kaj pli kreskadis la nombro de la kolektantoj, inter kiuj troviĝis reprezentantoj de plej diversaj profesioj kaj medioj, aperis multaj asocioj kaj societoj, kiuj instigis esplori ekslibrisojn, zorgis pri kreado de novaj signoj, organizis ekspoziciojn kaj helpis interŝanĝi, eldonadis librojn. Kiel kunvenejoj kaj renkontejoj, ili estis ankaŭ medio inspiranta artistojn kaj fervoriganta kolektantojn. Oni komencis klasadi la signojn surbaze de diversaj principoj, ekz. laŭ landoj, urboj, eĉ kvartaloj, laŭ stiloj, ornamaj motivoj, teĥnikaj metodoj, profesio de la kolektantoj k.t.p. Komenciĝis vasta interŝanĝado kaj intervendado. Oni ekesploris la ekslibrison, kreskis faka literaturo pri ĝi; sole la pola bibliografio pri l' ekslibriso ampleksis en la mezo de la 20-a jc. ĉirkaŭ 1000 titolojn.

Aperis ankaŭ diversaj societoj. Al la plej fruaj apartenis la londona Ekslibrisa Societo fondita en 1890, kun propra revuo *Journal of the Ex-libris Society*. Ekde 1891 vigle laboris la germana Ekslibrisa Societo, same kun propra revuo *Ex-Libris-Zeitschrift*. Du jarojn pli poste societiĝis la parizaj ekslibrisuloj kaj komencis eldonadi la revuon de *Société française des Collectionneurs d'Ex-libris*. La usona, en 1896 naskiĝinta Ekslibrisa Societo, havis nelongan vivon.



En Pollando, Societo de Ekslibrisamikoj ekagis en 1924, en proksima tempo la ĉeĥoslovakaj kolektantoj grupiĝis en Societo de Kolektantoj kaj Amikoj de l' Ekslibriso, Sveda Ekslibrisa Asocio fondiĝis en 1934. Tiel iom post iom la ekslibrisa movado konkeris diversajn landojn, fortiĝis kaj senĉese kreskadis. Bedaŭrinde, tiun elanemon brutale interrompis la dua mondmilito. Post ĝi la movado pene kaj lante reakiras sian antaŭan forton.

Kiel natura rikolto de la menciita kolektemo aperis grandaj kolektoj de ekslibrisoj. Plej ofte temis pri posedaĵoj de privatuloj, sed eĉ pli grandajn kolektojn akiris diversaj institucioj, precipe bibliotekoj kaj muzeoj. Al ili apartenas unuavice Borsa Societo de la Germanaj Librovendistoj en Lejpcigo. Ĝi ricevis donace la privatan kolekton de *A. Kirchhof*, transprenis la kolekton de *Lampertz*, aĉetis tiun de *A. Butsch*, kaj poste pligrandigadis sian posedaĵon per interŝanĝo kaj pluaj aĉetoj.

Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno havas 40.000 pecojn, Nacia Biblioteko en Parizo — pli 130.000, *Osolinski*-Instituto (*Ossolineum*) en Vroclavo — 30.000. La plej riĉa tiurilate estas eble Brita Muzeo, kies kolekto proksimiĝas al 100.000.

## 6. Ekslibrisologio

Pri ĉiuj problemoj de l' ekslibriso okupiĝas la ekslibrisologio, scienco juna, esploranta la librosignojn kiel fontojn por ekkoni la historion de la bibliofilio kaj bibliotekoj, ĉefe privataj. Ĝi ekspluatas atingojn de aliaj sciencoj, ekz. de la historio, arthistorio, heraldiko, genealogio k.s. Kion povas diri ekslibriso? Ofte nemulte aŭ eĉ tute nenion krom la nomo de la posedanto. Sed se la signon kreis inspirita artisto, aŭ se ĝin elpensis mensa grandulo, se ĝi enhavas kernan, profundan penson, se ĝi prezentas ne hazardan iun ajn bildeton, sed ion ĝisfunde pripensitan, tiam per esploro de l' ekslibriso eblas penetri profunden en la vivon, guston, plaĉojn kaj dezirojn de tiu homo, kies personecon ĝi spegulas. Tiam ĝi rakontas pri homo, tempo, loko, medio, eventoj...

La fama franca verkisto *Victor Hugo* havis ekslibrison, sur kiu ties aŭtoro

*Bouvenne* prezentis profilon de la pariza katedralo de Sankta Virgulino. Supozeble ne estis hazardo, ke la verkisto elektis ĝuste tiun temon. La unika konstruaĵo kaj ĝia historio, kun siaj veraĵoj kaj fabelaĵoj, certe profunde impresis kaj obsedis lin, ja estus neimageble, ke sen tio aperus verko, kia estas *Notre-Dame de Paris*.

La poeto *Baczyński* dum la dua mondmilito havis ekslibrison, sur kiu du viroj batalas per glavoj: la unua, en lumo, atakas brutale, dum la dua, duongenuante en mallumo, defendas sin heroe. La bildo simbolis do fortojn: la germanan okupacianton kaj la polan konspiran armeon. *Baczyński*, ano de la konspira armeo pereis poste en la varsovia ribelo.

En la 18-a jc. *Maksimiljan Siedlnicki*, pola nobelo translokiĝinta al (tiam germana) Silezio, farigis por si ekslibrisojn. Sur la unua, la surskribo klare diras, ke la signo apartenas al *Max(imilian) Odrowąż-Siedlnicki*. Sur la dua, la nomo akceptis la formon *Sidlnicki*, kaj la tria ekslibriso jam fiere sciigas pri reinkarnacio de la posedanto: *Max. Sedlnitzkij S..R.I. Comes de Cholnitz.*

Ni prenu ankoraŭ unu ekslibrison. Majstra mano de la grafikistino (Fialkowska) ĉizis en la ligna briko malnovstilan domon, sur kies supro situas kupolo. Dekstre supre brilas hele la Suno, sube staras tri malnovaj libroj kaj apud ili iaj instrumentoj strangaj — cirkloj, duoncirkloj kun skaloj? Kiu estas la posedanto? Por kio servas la kupolo? Ĉu en ĝi li observas la Sunon? La instrumentoj asociacias kun sunhorloĝoj, ĉu eble li okupiĝas pri tiu aferoj? La surskribo ĉirkaŭ la bildeto tekstas: *Ex libris gnomonicis Felicis Przypkowski.*

Ni eble pravis, gnomoniko estas ja scienco pri antikvaj tempomezuriloj. Sed ni serĉu en enciklopedioj, eble ili donos pli klaran informon. Kaj fakte, estas: "*Przypkowski Felix* — bibliofilo kaj elstara astronomo okupiĝanta ĉefe pri gnomoniko, t.e. tiu parto de l' astronomio, kiu esploras malnovajn metodojn de tempomezurado kaj konstruas koncernajn mezurilojn — sunhorloĝojn, lunhorloĝojn kaj stelhorloĝojn. Li fondis en 1895 en *Jedrzejów* muzeon, kies gnomonika parto apartenas nun al la plej riĉaj kolektoj en la tuta mondo".

Similajn ekzemplojn ni povus citi plue, ne tio tamen estas nia tasko. Ni volas nur pruvi — kion ni jam menciis — ke valora ekslibriso, kreita post profunda pripenso kaj fare de talenta artisto, similas al bona, konciza poeziaĵo, pri kiu la eminenta esperanta poeto *Kalocsay* prave diris:



"...ke povas la sonet' dekkvarlinia pli diri ol volumo milfolia".

## 7. Elektita literaturo

*Adarjukov, V.J. (1921): Russkij knîjnij znak. - Moskva.*
*Allen, C.D. (1895, II ed. 1968): American Book-Plates s.l.*
*Antoŝevskij, I.K. (1913): Russkie knîjnie znaki. - Spb.*
*Bohatta, H. (1926): Das Supralibros.*
*Bouchot, H. (1891): Les ex-libris et la marque de possession du livre. - Paris.*
*Braungart, R. (1919): Neue deutsche Exlibris. 2-te Folge. - München.*
*Brun, R. (1948): La Livre français. - Paris.*
*Collijn, I. (1907): Det Rosenbergska biblioteket och dess Exlibris. - Stockholm.*
*Donin, R.K. (1949): Stilgeschichte des Exlibris.*
*Frejman, R. (1922): Kratkij istoriĉeskij oĉerk knîjnogo znaka.*
*Pb. Gelli, J. (1930): Gli Exlibris italiani.*
*Hardy, W.J. (1897): Book Plates. - London.*
*Leiningen-Westenburg, K.E. (1911): Exlibris.*
*Ryszkiewicz, A. (1959): Ekslibris polski. - Warszawa.*
*Schwenke, J. (1947): Exlibriskunde. - Amsterdam.*
*Zur Westen, W. von (1925): Exlibris (Bucheignerzeichen). - Bielefeld.*

## Ekslibrisy

*W powyższym szkicu, stanowiącym jeden rozdział większej pracy pt.* Szkice bibliologiczne, *autor przedstawia dzieje edslibrisu od jego początków aż po dzień dzisiejszy , a następnie prwytacza nazwiska najwybitniejszych twórców tego znaku własnościowego.*

*Z kolei omawia różne techniki wykonania — np drzeworyt, miedzioryt, linoryt, litografię, akwafortę, akwatintę —, zbieractwo i jego zasady, wymienia największe kolekcje, towarzystwa zbierackie, czasopisma, a w końcu zwięźle analizuje znaczenie ekslibrisu w badaniu dziejów bibliotek i bibliofilstwa, kończąc omówieniem ekslibrisu jako dzieła sztuki już oderwanego od jego funkcji w książce.*

# Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

kies centra sidejo estas ĉe Mondkomerca Eldonejo Esperantista, P.O. Kesto 25041, *3001 HA, ROTTERDAM,* Nederlando, sendis al nia redakcio luksan eldonaĵon de Komerc- kaj Industri-ĉambro de la Departemento *Meuse*.

Temas pri la kvarlingva (*fr-de-en*-Eo) INDEKSO DE LA MOZAJ PRODUKTAĴOJ (*REPERTOIRE DES PRODUITS DE LA MEUSE*).

Sur p. 5-9 oni trovas laŭalfabetan franclingvan liston kun la referenc-paĝoj kaj kun la tri ceter-lingvaj ekvivalentoj.